

SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio	E1 Vol. 27 n-ro 2/3(118/119) 30.06.1976.
--	--

LA HUNGARA POPOLKANTO

(L.LESZNAI, BUDAPEST, HUNGARIO)

La vojaĝantoj kaj turistoj, kiuj vizitas Hungarion, tre ofte interesiĝas pri la hungaraj popolkantoj; ili rememoras verkojn de *Francisko Liszt* kaj de *Johannes Brahms* kaj serĉas ciganojn por aŭdi veran hungaran popolmuzikon. La kaŭzo de ĉi tiu deziro estas miskompreno. La ciganoj, kiuj estas nacia minoritato en Hungario, ne povas esti la veraj reprezentantoj de l'popolmuziko de la hungara nacio. La veran nacian popolmuzikon reprezentas la kamparanoj. Se ni do parolas pri la hungara popolkanto, tio signifas la hungaran kamparanan kanton. La okcidentaj kaj ĝenerale la nehungaraj muzikantoj scias tre malmulton pri tiu ĉi popola muziko kaj pensas, ke la vera hungara popolmuziko estas la tiel nomata ciganmuziko.

Sed eĉ pri la tiaspeca muziko la eksterlandanoj ne scias multon. La mondfama hispana violinisto de la pasinta jarcento, Pablo de Sarasate komponis verkon por sia instrumento sub la titolo *Ciganaj melodioj*. En la kvin melodioj de ĉi tiu verko du estas komponaĵoj de *János Bihari*, unu de *Elemér de Szentirmay* kaj du de *János Lavotta*. Videble estas do, ke eĉ tiuj melodioj, kiujn multaj konsideras ciganaj, ne estas ti-

Je komenco de ĉi tiu jarcento du geniaj hungaraj komponistoj, kiuj estis samtempe eminentaj muziksciencistoj - *Béla Bartók* kaj *Zoltan Kodály* - trovis la ĝis tiam ne konatajn hungarajn kamparanajn kantojn. La historia evoluo de Hungario kaŭzis, ke eĉ la hungaraj urbuloj ne havis ideon en tiu tempo pri la ekzisto de ĉi tiu bela kaj valora popolmuziko. Unu el la ĉefaj kaŭzoj de la izoliteco de urbaj kaj kamparanaj loĝantoj en Hungario estis la fakto, ke granda parto de la lando estis dum proksimume 150 jaroj okupita per la turkoj, en la 16. kaj 17. jarcentoj. Tiu ĉi fakto kaŭzis ne nur la konservadon de la popola lingvo, kiu fundamente diferas de la indo-eŭropaj lingvoj, sed la konservadon de la feuda vivkaj pensmaniero kaj kune kun ili la specialan apartan popolmuzikan stilon.

+ + +

Kio estas popolmuziko? *Béla Bartók* donis bonan difinon de ĝi en unu el siaj muziksciencaj verkoj: *La popolmuziko konsistas el kantoj, kiujn multaj homoj dum multe da tempo kantas*. En ĉi tiu okazo multaj homoj signifas multajn milionojn da homoj kaj multe da tempo multajn jarcentojn.

La historio de la hungara popolmuziko komenciĝas tiam, kiam finnaj-ugraj kaj turkaj triboj aŭ partoj de triboj unuigis je pli aŭ malpli organika popolo en la ĉirkaŭaĵo de la montaro Ural aŭ Okcident-Siberio en la hodiaŭa Sovetunio. Ĉi tio okazis supozeble en la unuaj jarcentoj de nia tempokalkulo kiel parto de la granda popolmigrado.

La historiaj faktoj kaj la vojo de l'evoluo devas esti en ĉi tiu okazo esplorataj sole per specialaj metodoj, ĉar skribaj pruviloj, dokumentoj ne ekzistas el ĉi tiu tempo - eĉ verŝajne neniam ekzistos. Bonan rimedon de l'esplorado donas en ĉi tiu okazo la muzikaj stilelementoj.


La hungaraj popolmelodioj povis gardi ĝis nia tempo siajn karakterizajn turnojn kaj figurojn, kiuj estas troveblaj eĉ hodiaŭ en multaj popolmelodioj de Mez-Azio. Tiel aperas

speciala popolkanta maniero kaj stilo kies radiado atingas grandegajn tempajn geografiajn distancojn.

La presa eldono de la hungara popolkanto-trezoro fariĝis nur post la dua mondmilito ebla. La hungara ŝtato ofertas konsiderindan sumon por realigi ĉi tiun planon, kiun dorlotis dum multaj jardekoj la esplorintoj de la hungara kamparana kanto. La eldona laboro daŭras eĉ nun kaj aro da scienculoj kaj fakuloj laboras sindone por ĉi tiu alta celo. Ĝis nun aperis 6 volumoj, enhavantaj pli ol 6.000 melodiojn taŭgajn por scienca esplorado.

Por montri la eksterordinaran amplekson de la disradiado de ĉi tiu popolmuzika stilo, mi citas kiel ekzemplon ĉinan popolkanton el la provinco Ŝantung:

1. notekzemplo: Ĉina kanto



Post ĉi tio sekvas popolkanto de la tribo *mari*, kiu estas en la pra-tempoj parenca kun la tiamaj hungaroj; ili vivas nun en la ĉirkaŭaĵo de Volga (en la hodiaŭa Sovetunio):

2. notekz.: *mari*-popolkanto

Aŭskultante la sekvontan hungaran popolkanton el Transdanubio, do el la plej okcidenta parto de la nuna Hungario, certe ne necesas esti muziksciencisto por konstati, ke ĝi estas tre proksime parenca al la antaŭaj du aziaj popolmelodi-oj:

3. notekz. Hungara popolkanto

Ha Du-ná-mel fejj a vzel, min-deu-hun arab min-kef es
 Du-na-mel fejj a vzel Ha Du-na-mel nam fejj-na,
 i-lyen hi-daj nam val-na, Du-na-mel fejj a vzel.

Tiuj ĉi tri kantoj, almenaŭ ilia originala formo naskiĝis tute certe el unu branĉo. Ni havas nun antaŭ ni seninterrompan muzikan linion de Ĉinio ĝis la landlimo de la nuntempa Aŭstrio. La muzikaj mejloŝtonoj, kiujn ni aŭdis signas grandegan vojon kie estas troveblaj aliaj parencaj muzikaj mondoj, ekzemple la popolkantoj de la nacienco ĉuvaŝ, de la baŝkiroj, mongoloj ĝis la diversaj dialektoj de la ĉinaj - ĉefe de la nordaj ĉinaj - popolmuzikoj. La ĝis nun menciitaj faktoj pruvas, ke ni nun renkontiĝis kun popolmuzika trezoro, pli aĝa ol jarmilo.

Por noti la strukturon de la melodioj, mi uzas majuskulojn por melodilinioj kun la sama muzika enhavo; la intervalon mi signas per la respektiva numero kaj la variantojn per la litero "v".

La strukturo de la mari-kanto estas do: AB A_v5B_v5. La citita hungara popolkanto reprezentas en pura formo la form-principon ABA₅B₅, kiu karakterizas grandan parton de la plej

antikvaj hungaraj popolkantoj kaj same multajn samaĝajn popolmelodiojn vivantajn eĉ nuntempe en Azio.

+ + +

Por pli forte akcenti ĉi tiun formprincipon, sekvas nun alia hungara popolkanto, reprezentanta la saman strukturon ABA₅B₅

4. notekz.

Parlando

Le-ozál-loth a ta-va Vár-me-gye-há
za-ta. De nem ám a ta-bok Sza-ba
du-kí-sá-ma

// La du lastaj tonoj estas variataj kadencoj//.

La sekvonta hungara popolkanto havas la saman strukturon ankaŭ ĉi tie estas la du lastaj tonoj kadencaj:

5. notekz.

Tempo giusto

Jü-ki dísz-me a be-tek-lül csak a fü-lö lej-sik,
ka-nász-e-gény a bo-ros-ba me-nyes-kök-kel jüt-szik.
El-se-ozett a sis-ká-jó ki-leuc ma-ta-cá-val,
Al-tá-na-ment a ka-nász ü-res la-nisz-nyá-sul.

La popolo, precipe en la fruaj tempoj, ne konis la muziknotojn kaj la popolkantoj vivis en la prezentado de la kantan-
toj. Dum la multaj jarcentoj evoluigis speciala popola tradi-
cia prezentadmaniero. Ĉi tiun prezentadmanieron estas tremal-

facile fiksi per muziknotoj kaj la tiel fiksitajn notojn ne estas facile legi. Nun sekvas ekzemplo por ne tro komplikita prezentado de hungara popolkanto:

6. notekz.

Tű súl tó nám tő sul A Mál-más et-de-jén,
 a Mál-más et-de-jén En meg in-nen sí-rok
 A bá-mat me-ze-jén, a bá-mat me-ze-jén

La ĝisnunaj kantoj staras en la kvintona gamo, en la t. n. pentatonio, kiu fundamente diferas de la hodiaŭa ĝenerale uzata septona gamo; ĝi estas la bazo de la kutima muzikkulturo de Mezeŭropo. Rimarkinde estas, ke la pentatona gamo, kiu regas en la hungara antikva popolkanto, ne enhavas duontonon kaj ĉi tiu fakto donas al la melodioj karakterizan atmosferon, karakterizan malmolecon.

El ĉio ĉi tio sekvas, ke la antikvaj, pentatonaj melodioj ne estas harmoniigeblaj laŭ la kutimaj mezeŭropaj uzoj. La veraj hungaraj popolkantoj pro tio ne povas esti kantataj ekzemple kun tercoj ktp. kiel la germana aŭ la rusa popolkanto. Tiuj popolkantoj, kiujn oni povas kanti en paralelaj tercoj, ne apartenas al la veraj malnovaj hungaraj kamparanaj kantoj.

+ + +

Nun sekvas kiel ekzemplo hungara popolkanto, prezentata per virina floro:

Ekzemplo

Tételepo újirató

Hűj kék hí-kom la-va-li, hű-roin hat-mad-é-vi,
 He lud-tá-tok, hogy az e-nyém, miért ad-la-tok en-ni?
 Tju-tyu szö-ke, tju-tyu kas-ma, tju-tyu mind a há-rom
 A ka-ka-som am vé-ult-él, min-csen sem-mi kéi-rom

La antikvaj stilaj trajtoj de la popolkanto herediĝis al la kantoj de la postaj jarcentoj. Ekzemplo por ĉi tio estas la tiel nomata historia kanto; ĝi estas kantata kroniko. Nun sekvas tia kanto-balado pri István Kádár, hungara heroo, kiu mortis en batalo kontraŭ la turkoj en la jaro 1657. La kanto ekestis supozeble en la sama jaro, aŭ 2-3 jaroj poste. La kanto do estas pli ol 300 jara;

7. Notekz.

Kaslemlato

Szépen meg dom-lás-ma ké-siel Kan-mo-mi-a
 ki-mek mint lén-ges-mek meg-é-na-óó lób-ja
 sok bú-mek, bú-met-mek kőc-nyul-sel-ke as-ja
 Hart a sí-té-zek-mek e-selt ma egy lú-já

Multaj restaĵoj el la pagana pratempo, sorĉaj diroj de iamaj epokoj vivas eĉ en la nunaj tagoj kiel infanludoj. La sekva hungara infanlud-kanto estas atestanto de pagana kulto. Precipe la ritmo estas karakterize hungara, la melodio iom malpli, ĉar la infanludoj havas apartan kaj unikan stilon. La infanoj ne kantas false; la eksonontaj duontonoj estas tradiciaj, kion pravas la fakto de la pura sono de la tonoj:

8. Notekz.

Hoj, szé-na al-ja, szé-na aza-ka-tek-ja, ben-me va-gyon ke-rek asz-seny,
köy-mgen, köy-mgen me-mges-ke O-do-ti-ja ó-beld, a-kit sze-retel,
bor-do-ti-ja ó-beld, a-kit sze-retel,
Ezt ó-le-Com, ezt co-ko-Com Zeb-szel-da Ju-lis-ka is
írá-jom is-lea las-ai es-öt J u - lis - ka Ma-ris-ka is
mos-sa Joz-sze mind-a ket-töt J u - lis - ka Ma-ris-ka is
to-vább is, rakd i-de, rakd o-da, a mi há-zunk
e-le-ji-be To-vább is!

Sed en kelkaj kantoj el la pratempoj de la pli aĝaj homoj paganaj restaĵoj estas konstatablaj. Kiel ekzemplo sekvas nun tradicia novjara kanto, kun sonoriloj. La sonoriloj havas evidente la taskon forpeli la malbonajn spiritojn:

9. Notekz.

Hisz jász, ma kerek né fűrés szent Ist. van ki-ni-lyünk
mi-m-va-gyünk ó-r-ül-gök ha-mem a ki-ozol-gár-ül:

haj, re-jo haj-ta, mit is mag-od - hat-ja az a nagy ir- is-ten.
 Ad-ja, az el- is - en-nel a jüe- dá-mek két hold
 fel-del, azar ke-revzt bú-zát haj re-jo' haj- lu,
 mit is mag-od - hat-ja az a nagy ir- is-ten

Jam antaŭ multaj jarcentoj la hungaroj estis tre grand-nombre paŝtistoj. La paŝtisto pasigas sian tempon plejparte sola, dume li eltrovas kaj kantas prefere kantojn kun lirika enhavo, kiuj estas kanteblaj nur sola. Tian kanton mi citas nun:

10. Notekz.

Portlando

A ta-má-si, a ta-mú-si, a ta-má-si nagy-son-dág-ló
 Ab-ba sé-tal, ab-ba sé-tal, ab-ba sé-tal a re-ge-narac.
 me-mu-tyes tárd ki ha-buim két ku-ro-lut, ó-talj mag,
 nagy a fel-ceses ku-tya fel-ceses ku-tya fel-ceses me vi-si két-
 has-son mag

Eĉ en nia epoko naskiĝas hungaraj popolkantoj, malgraŭ gramofono kaj radio. En la novaj hungaraj popolkantoj novaj stilaj trajtoj estas konstateblaj; ĉi tie mi mencias nur la

leviĝantan melodian linion kaj la ripetadon kaj reprizon.

La sekva hungara popolkanto enhavas ĉi tiujn karakterizajn trajtojn. La unua melodilinio ripetiĝas transponite sur pli altan nivelon kaj eksonas la duan fojon kun alia finaltono, do kun eta varianto, poste sekvas la unua melodilinio. Ĝia strukturo do estas: AA^{5A}A^{5VA}. Tiamaniere ĝian muzikan materialon la kanto prenas el unu melodilinio:

11. Notekz.

Tempo giusto

Aj-fa-lu-si bi-ro le-ve-let ka-pott, Szed-je őz-sze
mind a fi-a tal-sa-got, Szed-je őz-sze mind a fi-a
la-lo-kat, A-kik he-ma-ru-d-lik, sa-j raj a-zo-kat.

Kion mi povus almeti ankoraŭ? La plej granda artisto, la popolo mem prezentis siajn trezorojn kaj la plej grandaj artaj kreantoj estas tiuj artistoj, kiuj scias, kiel lerni de ili.

Ekkoni la popolkanton signifas proksimiĝi al la popolo mem. Ĉi tio estas grava celo de nia movado. Kaj se almi sukcesis ĉi rilate aldoni eron, tiam, laŭ mia konvinko, mi fortigis la movadon de la homa interrilato, nian movadon de la internacia lingvo Esperanto.

TEKSTOJ DE LA POPOLKANTOJ
(krudaj tradukoj)

1.

- Nokte dum la unua sonorila sono mi prenas mian arĝentan lampon kaj ensaltas en la ĝardenon. Mi frapas sur la pordo; mi timas, ke la homoj ekaŭdas ĝin. - Nokte dum la dua sonorila sono mi parolas mallaŭte al mia karulino. - Ŝi ekaŭdas ĝin kaj malfermas la pordon; mi ekprenas ŝian manon.

2.

- Ĝardeno, ĝardeno, eta ĝardeno, en eta ĝardeno flava birdo. La flava birdo balanciĝas sur la branĉo, aj-aj Ĉepani, finiĝis via virgeco. Ĝardeno, ĝardeno, eta ĝardeno, en eta ĝardeno flava birdo. Flava birdo balanciĝas sur branĉo. Aj-aj Onderi, finiĝis via fraŭleco.

3.

- Se vento blovas de la Danubo, ĉie ĝi atingas nur nin, de la Danubo vento blovas. Se ĝi ne blovas de la Danubo, ne estus tiel malvarme - de la Danubo vento blovas.

4.

- Alflugis la pavo al la estra domo, sed ja ne por liberiĝo de la kaptitoj.

5.

- Jen-jen porko, el la arbeto vidiĝas nur ĝiaj oreloj - porkpaŝtisto en arbeto ludas kun virineto. - Perdiĝis lia granda porko, kun siaj naŭ porkidoj, postiris la paŝtisto kun sia malplena pansako.

6.

- Vi estas transe, karulino, transe de la arbaro de Malnaŝ. Kaj mi ĉi tie ploras sur la kampo de la ĉagreno.

7.

- Al terura pereco preparas sin Pannonia, kiel ŝvelantaj ondoj de l'maro. Fluo de multa malĝojo kaj ĉagreno ĉirkaŭprenis ĝin, ĉar unu el la herooj perdiĝis hodiaŭ.

8.

- Ne estas bone tradukebla, ĉar la infanludaj tekstoj enhavas kelkajn sensencajn vortojn.

9.

- Simila estas la afero kun la kultaj tekstoj, el kiuj multaj esprimoj jam perdis sian sencon.

10.

- Kiel alta estas la restoracio de Tamaŝi. En ĝi iradas la ĉefkuracisto de la regimento. - Malfermu viajn brakojn, amatino, ĉirkaŭprenu min, por ke la kuracisto, la malbenito, ne povu min ekzameni.

11.

- La vilaĝestro de la vilaĝo AJ ricevis leteron, ke li kolektu ĉiujn junulojn, eĉ tiujn, kiuj ankoraŭ restis ene.